DIA REGNO
ISSN 0167-9554

# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 2 (887) • 2011 •

*Kelkaj anĝeloj*
*havas faldajn vizaĝojn kaj kalajn manojn,*
*sed ili konas la vojon kaj ties danĝerojn,*
*ili prenas nin firme al la mano*
*kaj gvidas nin*
*kun la tuta sperto de iliaj jaroj,*
*se ni devojiĝis.*

*Kelkaj anĝeloj*
*paŝetas scivoleme sur gambetoj en la vivon,*
*ne havas antaŭsenton, kien la vojo gvidas,*
*sed ili prenas nin*
*kun brilanta rideto*
*kaj plene de senlima konfido*
*firme al la mano*
*kaj esperas, ke ni gvidas ilin.*

*Kelkaj anĝeloj*
*eĉ ne scias, ke ili venas de Dio,*
*nur, ke ili estas destinitaj unu por la alia*
*kaj ne rajtas malteni ilin.*

Inge Müller, DE
Tradukis Siegfried Krüger, DE

**KELI**
**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021;
💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel POLNICKÝ;
✉ Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio
✆ +420 325 615 651; 💻 cea.polnicky@quick.cz

**Kasisto**: Siegfried KRÜGER
✉ Claudiusweg 10,
DE 74074 Heilbronn, Germanio
✆ +49 7131 162688;
💻 siegfriedkrueger@arcor.de

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI ĉe ING Bank N.V.: 5506132. Kontonomo: INT CHR ESPERANTO BOND - KELI - BIC: INGBNL2A; IBAN: NL86INGB0005506132

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

**DIA REGNO**

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Västergårdsg 15; 256 64 Helsingborg; Svedio;
✆ +46 (70) 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec

## ENHAVO

| | |
|---|---|
| Farante la neeblan | 27 |
| Skizoj pri filozofoj-kuracistoj, VI | 30 |
| Patro Aleksandro Men | 34 |
| Mi memoras | 36 |
| Kongolando la koro de Afriko | 37 |
| … homoj absolute ne 'duarangaj' | 38 |
| Kelkaj Ideoj de S Kierkegaard | 40 |
| "...tie estos ankaŭ via koro" | 44 |
| Werl: Bibliaj tagoj 2-6a de marto | 46 |
| Mi komencis lerni … | 47 |
| Psalmo 138 - Mi gloras vin el … | 48 |

## REDAKTORAJ VORTOJ

Hodiaŭ mi la unuan fojon tondis la razenon ĉi-jare. La printempo jam alvenis al ni kun inspiro kaj ĝojo. Estas reviglige vidi la freŝajn florojn kaj aŭdi la alvenintajn birdojn kanti kiam ili preparas la nestojn kaj novan vivon. Kvankam la korpo jam maljuniĝis per unu jaro, la interna animo sentas sin denove juna.

La jena numero de Dia Regno ne enhavas tradician paskan artikolon aŭ mesaĝon. Sed mi pensas ke la enhavoj de la artikoloj estas ĉiame valoraj. Parte ĉar la mesaĝo de Pasko estas fundamenta kaj ĉiutaga ero en nia kristana vivo.

Ĝi ankaŭ ne enhavas multajn memoraĵojn pri nia KELI. Eble devus. Mi ricevis kelkajn fotojn el la KELI-vivo sed mi volonte akceptas pli da memoraĵoj por prezenti al la legantojn. Kion vi ŝatus ke aliaj sciu?

Fine mi deziras al vi Gajan Paskan feston.

# Farante la neeblan

Bayo AFOLARANMI, NIĜERIO
Baptist Building, Oke Bola, PMB 5113, Ibadan 200001,

*Kaj en la kvara gardoparto de la nokto li venis al ili, irante sur la maro. Sed la disĉiploj, vidante lin iranta sur la maro, maltrankviliĝis, dirante: Jen fantomo; kaj ili ekkriis pro timo. Sed tuj Jesuo parolis al ili, dirante: Kuraĝu; ĝi estas mi; ne timu. Kaj responde al li Petro diris: Sinjoro, se ĝi estas vi, ordonu min veni al vi sur la akvo. Kaj li diris: Venu. Kaj Petro, malsuprenirinte el la ŝipeto, iris sur la akvo, por veni al Jesuo. Sed vidante la venton, li timis, kaj komencante subakviĝi, li ekkriis, dirante: Sinjoro, savu min. Kaj tuj Jesuo etendis la manon kaj ektenis lin, dirante al li: Ho malgrandfidulo, kial vi dubis? Kaj kiam ili supreniris en la ŝipeton, la vento ĉesiĝis”* (Mat 14,25-32).

Mirakloj estas eksterordinaraj okazaĵoj montrantaj dian intermeton en homaj aferoj. Ili estas tio, kion ni konsideras neebla. Multaj el la mirakloj estas lertaj respondoj al neeblaj situacioj. Estas fakto ke Dio ne venas de ĉielo por fari ian miraklon. Li uzas homojn. Kelkfoje, la homoj kiujn Li uzas estas tiuj por kiuj la mirakloj okazos en iliaj vivoj. Ĉi tio okazis en la rakonto kiu estas trovita en Mateo 14,25-33. Du homoj (Jesuo kaj Petro) faris ion, kio estas neebla: iro sur la akvo. Oni eble ne estas surprizita ke Jesuo iris sur la akvo. Krom tio, Li estas la Sinjoro de ĉio. Tamen, por Petro, ordinara homo, fari la neeblan irante sur la akvo li devis fari kelkajn aferojn, kiuj estas notindaj.

**La unua afero** kiun Petro faris estis ke li rekonis la Sinjorecon de Jesuo (versikloj 25-28a). Antaŭe, kiam la aliaj disĉiploj kun Petro vidis Jesuon Kriston irante sur la turmentata maro nokte, ili pensis ke Jesuo estis “fantomo”. Jesuo devis recertigi ilin ke ĝi estis Li. Petro poste alparolis al Jesuo kiel “Sinjoro”. Ankaŭ multaj homoj ne rekonas Jesuon kiel la Sinjoron pro la cirkonstancoj ĉirkaŭ si.

**La dua afero** kiun Petro faris estis ke li faris la iniciaton (versiklo 28b). Li vidis Jesuon farante la neeblan, kaj li faris la iniciaton petante de Jesuo por ordoni lin ankaŭ fari la saman

aferon. Nia ĉiela Patro scias tion kion ni bezonas, sed Li volas ke ni faru la iniciaton petante de Li por tiuj bezonoj (vidu: Mat 6:8). Jesuo ordonis Petron veni al Li post kiam Petro jam faris la iniciaton.

**La tria afero** kiun Petro faris, estis ke li estis preta forlasi sian komfortan lokon (tio estas, la komforton de la la ŝipeto) (versiklo 29a). Malgraŭ la fakto ke la ŝipeto estis turmentata per la ondoj, estis pli sekure esti en la ŝipeto ol esti ekster la ŝipeto en la akvo. Psikologike, forlasi la aliajn disĉiplojn en la ŝipeto estus problemo por Petro, sed li ne konsideris tion. Iu ajn kiu faros la neeblan, devas esti preta lasi sian komfortan lokon, ne gravas kiom ĝi kostas al li/ŝi. Tia persono ne estas kontenta per la mezkvalita situacio en kiu li/ŝi trovas sin.

> Iu ajn kiu faros la neeblan, devas esti preta lasi sian komfortan lokon, ne gravas kiom ĝi kostas al li/ŝi.

**La kvara afero** kiun Petro faris estis ke li moviĝis al Jesuo (versiklo 29b). Kiam li eliris el la ŝipeto kaj ekiris sur la akvon, li ne moviĝis al ia ajn alia flanko krom la flanko de Jesuo. Li sciis ke li estas iranta sur la akvo pro Jesuo ĉar sen Jesuo li povis fari nenion (vidu: Johano 15,5b). Li ne estis fiera pri si. Iu ajn kiu volas fari la neeblan, povas esti preta esti Diokonscia kaj ne egoisma.

**La kvina afero** estas ke iu ajn kiu volas fari la neeblan, povas esti preta por provoj de kredo (versiklo 30). Oni devas noti ion ĉi tie pri kiu la skribintoj de la Evangelioj estis silentaj: kion la aliaj disĉiploj diris aŭ faris kiam Petro estis eliranta el la ŝipeto kaj ekiris sur la akvon? Ĉu ili malkuraĝigis aŭ kuraĝigis lin? Se ili ne diris aŭ faris ion ajn kiel la Sankta Biblio montras ĝin, kio estis la sinsekvo de ilia apatio por Petro? Nu, Petro estis iranta sur la akvo, sed li konsideris la regan cirkonstancon (la venton) kaj li komencis subakviĝi. La ago aŭ neago de la aliaj disĉiploj kaj la turmenta vento estis provoj de kredo por li. Bedaŭrinde, li perdis fokuson de Jesuo al kiu li estis moviĝanta. Ĉi tio igis lin komenci subakviĝi. Laŭfakte, je ĉi tiu mondo, iu ajn kiu faros la neeblan alfrontos multajn provojn de kredo. Tiaj provoj, kiuj eble estos en formo de io ajn aŭ bona aŭ malbona, estas neeviteblaj (vidu: Johano 16,33; Agoj 14,22; 1 Tesalonikanoj 3,4; 2 Timoteo 3,12). Kiel vi reagas al ili? Ĉu estis ebla ke Petro dubis dum li iris sur la akvo? Jakobo diris, "*Sed li petu en fido, neniel dubante; ĉar la dubanto similas ondon de la maro, ventopelatan kaj skuatan. Ĉar tiu homo ne pensu, ke li ricevos ion de la Sinjoro – duoblanima homo, ŝanceliĝa en ĉiuj siaj vojoj*" (Jakobo 1,6-8).

Petro faris la pravaĵon: li alvokis la

Sinjoron (versiklo 30b). Li ne fidis al io alia. Kiel profesia fiŝkaptisto, li povis fidi al sia profesia sperto kaj provi naĝi aŭ reen al la sekuro de la ŝipeto aŭ al Jesuo. Li eble memoris pri unu el la multaj promesoj de Dio. Unu el tiaj promesoj estas, *"Voku Min en la tago de mizero; Mi vin liberigos, kaj vi Min gloros"* (Psalmo 50,15. Vidu ankaŭ: Psalmo 91,15; Jeremia 33,3; Mateo 7,7; Jakobo 5,13).

Iu ajn kiu faros la neeblan lernos ion de Jesuo

Iu ajn kiu faros la neeblan, certe spertos la fidelecon de Jesuo (versiklo 31). Petro jam faris eksterordinare bone antaŭ ol li forlokigis sian atenton el Jesuo, kaj li havis la sinsekvon. Tamen, li repaŝis siajn paŝojn alvokante Jesuon por helpo. La interesaĵo ĉi tie estas ke Jesuo estis preta helpi Petron, kaj Li ja helpis lin. Malgraŭ la ŝajna malfideleco kaj la malgranda fido de Petro, Jesuo restis fidela. Apostolo Paŭlo konfirmis ĉi tion: *"Fidinda estas la diro: ... se ni malfidas, li restas fidela; ĉar li ne povas malkonfesi sin mem"* (2 Timoteo 2,11.13. Vidu ankaŭ: Ploradoj 3,22-23).

Iu ajn kiu faros la neeblan lernos ion de Jesuo (versiklo 31). Atentu bone ĉi tiun versiklon: ĉu la komento de Jesuo ĉi tie estis riproĉo aŭ laŭdo? Se ĝi estus riproĉo, kial Jesuo riproĉis Petron kaj ne la aliajn disĉiplojn? Tamen, laŭ mi, ĝi estis kaj laŭdo kaj riproĉo. Almenaŭ, Petro havis malgrandan fidon dum la aliaj disĉiploj havis nenion. Oni ne bezonas grandegan fidon por movigi montojn. Aŭdu Jesuon: *"ĉar vere mi diras al vi: Se vi havas fidon, kiel semero de sinapo [tre malgranda semero], vi diros al ĉi tiu monto: Translokiĝu tien de ĉi tie, kaj ĝi translokiĝos; kaj nenio estos neebla por vi"* (Mateo 17,20). Jesuo atendas ke ni faru tiun malgrandan paŝon eĉ se ni faletos je ĝi. Rampanta infano ne estas tima ke li faletos dum li faras siajn paŝojn. Kvankam, li falas, li provas denove. Jesuo riproĉis Petron ne ĉar li faris paŝojn de fido, sed pro dubemo je la procedo. Se vi farus la neeblan, ne dubu ke Dio povas fari la neeblan per kaj en vi. La aliaj disĉiploj kiuj estis en la komforto de la ŝipeto estis nek riproĉitaj nek laŭditaj.

Fine, iu ajn kiu faros la neeblan ja spertos ke Dio faras la neeblan se li estus preta fari la emfazitajn aferojn kiujn Petro faris. Petro volis fari la neeblan, li faris kelkajn aferojn, kaj li spertis Dion, kiu estas super ĉiu, neebla en lia vivo. Ĉu ankaŭ vi volas sperti ĉi tiun Dion? Tiam, kuraĝu fari la neeblan farante kiel Petro.

Ĉu vi estas preta fari la neeblan irante sur la turmenta akvo de via vivo? Tial estu preta fari ĉi tiujn tri emfazitajn aferojn. Vi ja faros la neeblan irante sur la turmenta akvo de via vivo en la nomo de Jesuo. Amen.

# Skizoj pri filozofoj-kuracistoj, VI

## La triopo de la subkonscio: S. Freud, A. Adler kaj C.G. Jung

DUDICH, Endre, HU

*La efika psikologio devas esti profunda, individua kaj kompleksa*


Nuntempe en la ĉiutaga vivo oni ofte uzas nociojn kaj fakterminojn rilatajn al la homa psiko, ofte ignorante, ke temas pri specialaj fakterminoj de la psikoanaliza branĉo de psikologio. Indas do trarigardi, almenaŭ skize, kiuj estis ties kreintoj, kaj en kia konteksto tiuj terminoj estas originale uzataj.

### 1. FREUD, Sigmund

(1856 Freiberg – 1939 London)
Aŭstria judo, neŭrologo kaj psikiatro. Lian starton grave influis lia studvojaĝo al Parizo (1895), kie li praktikis en la hospitalo Salpetriére. Kun J. Bauer li prilaboris la katarzo-teorion de la neŭrozoj. Li estas la fondinto de la profundpsikologia skolo.

El la filozofoj pleje efikis al Freud la ekstreme pesimisma Arthur Schopenhauer (1788 – 1860), kies ĉefverko estas "*Die Welt als Wille und Vorstellung*". La mondo kiel volo kaj psika imago, 1818.

La bazaj konceptoj servantaj kiel fundamento por la interpretado de sonĝoj (*Traumdeutung*) estas jenaj.



Sigmund Freud

- Libido (seksa deziro)
- Libera asociado (spontana, ne memkontrolita kunligo de konceptoj)
- Subpremo (de emocioj kaj deziroj)
- Sublimado/transformo de la seksa energio al pli altaj formoj de agado)

Laŭ Freud, ankaŭ la misagoj (*Fehlleistungen*), ekzemple misparolo, misskribo ktp derivas el la subkonscio, ekzemple hororo anstataŭ honoro aŭ ŝtelo anstataŭ stelo.

La du bazaj instinktoj estas tiu de la memkonservado kaj tiu de la

konservado de la specio. Ilia komuna fundamento estas la libido, la seksa deziro.

Okazas, ke la konscia mi-o, ne akceptas la postulon de la instinkto, normale pro iu morala/etika konsidero, kiu derivas el la edukado aŭ el iu socia konvencio. Tiam la deturnita instinkto havas tri eblecojn.

- Serĉi kaj atingi kontentiĝon sur pli supra nivelo, pere de sublimado. Ekzemple: servi iun altan idealon: patrujon, popolon, Dion…
- Surmetante maskon, serĉi surogatan kontentigon, pere de iu simbolo. Ekzemple: anstataŭ amoro praktiki amikecon,
- Subpremite, subeniri en la subkonscion kaj tie validigi sian postulon. Ekzemple: transformi la emocion de la suferigita frustriĝo je agresiva venĝemo.

Sekve de tio, la homo (fakte, ĉiu homo) vivas duoblan vivon:

(a) eksteran, konscian, "normalan" vivon;
(b) internan, subkonscian, "kaŝitan" vivon.

La subkonsciajn postulojn de la rifuzitaj kaj subpremitaj instinktoj la konscia Ego devas daŭre cenzuri, kontroli.

Tiu duobleco kaŭzas la psikajn malordojn kaj malsanojn (neŭrozoj ktp.) Ties unusola kurac-ebleco estas la psikoanalizo. Tio estas: malkaŝi, rekoni, akcepti kaj prilabori la verajn postulojn de la subpremitaj instinktoj.

La sendubaj meritoj de Freud estas, ke li 1) rekonis kaj emfazis la psikologian gravecon de la subkonsciaĵoj, kaj 2) elmontris kelkajn mekanismojn de funkciado de la malsana psiko, kiuj ofte bone klarigas la situacion.

Sed li grave eraris ĝeneraligante tiujn mekanismojn. Nome li preteratentis (aŭ intence ignoris?) la aktivan, mem-evoluan aspekton de la individua psika vivo.

Li eĉ pli grave kulpis per tio, ke neis la ekziston de vere spiritaj faktoroj, interpretante ĉion kiel subpremitan aŭ sublimigitan instinkton.

Krome, laŭ Freud, sed precipe laŭ liaj simpligantaj disĉiploj kaj propagandistoj, la radiko de ĉiu manifestiĝo de instinkto estas la infana sekseco. Tio kompreneble provokis indignon kaj skandalojn en la tiama eŭropa "alta" socio, sed estis bonvenigata per tiuj, kiuj strebis al kompleta seksa libereco.

Post la *Anschluss*, la aliĝo de Aŭstrio al nazia Germanio (1938), Freud elmigris en Brition. – Li mortis tie (pro kancero de buŝo).

La plej gravaj verkoj de Freud:

- Studoj pri la histerio (kun hipnozo), 1895
- Tri eseoj pri la teorio de sekseco, 1905
- La instinkto de morto kaj la instinkto de vivo, 1920
- Malbonfarto en la kulturo, 1931
- Interpretado de sonĝoj, 1935


Freud forte influis multajn beletristojn.. Kiel ekzemploj estu citataj el la germanoj Thomas Mann, kaj el la hungaroj János Kodolányi.

Inter la marksistoj disvolviĝis speciale pensdirekto nomita "freudo-marksismo".

**2. ADLER, Alfred**
(1870 Vienna – 1937 Aberdeen)
Aŭstria kuracisto, psikologo kaj psikiatro. En 1911 li forlasis la skolon de Freud, kaj iĝis la „patro" de la t.n. indvidua psikologio. Ties bazaj nocioj estas jenaj.

- Volo de povo (*Wille zur Macht*)
- Frustriĝo (traŭmo pro sento de malsukceso) (*Frustration*)
- Sento de malplivaloreco (*Minderwertigkeitsgefühl*)
- Trokompensado (*Überkompensierung*)

Same kiel Freud, ankaŭ Adler opiniis, laŭ pure pozitivisma maniero, ke la individua psika vivo estas kvazaŭ fermita mekanika sistemo. Sed ĉe li la baza instinkto estas ne la libido, sed la volo de povo, kiun realigi la plejparto de la homoj ne kapablas. Tio estigas senton de malsukceso, malvenko, poste tiun de malplivaloreco. Pro tio oni strebas al kompensado, por restarigi la psikan ekvilibron. Sed el tio ofte rezultas trokompensado.


Alfred Adler

La solvo de tiu psika kaptilo estas: akcepti, ke oni povas esti valora personeco malgraŭ ĉiuj siaj maltaŭgaĵoj, kaj vivi laŭ la spirito de tiu rekono.

Verkoj de Adler:

- La fremda karaktero, 1912
- Kono de la homoj, 1927
- La malfacile traktebla infano
- La senco de la vivo,1933

**3. JUNG, Carl Gustav**
(1875 Kesswil – 1961 Küssnacht)
Svislanda psikiatro, prilaborinto kaj estro de la tria tendenco de la profundpsikologio. Li apartiĝis de Freud en la jaro 1913. Li prilaboris la t.n. kompleksan psikologion, el-irantan el la ekzisto de la kolektiva subkonscio. Jung supozis la ekziston de filogeneza heredaĵo en la sub-konscio, la t.n. prasperton (*Urerfahrung*). Karakteriza koncepto estas ankaŭ la *arĥetipo* (prabildo):

Jung praktikis psikoanalizon kaj psikoterapion en urbo Zurich. Li pli-disvolvis la nocion de *super-ego*.

Se la subkonscio estas la kelo de la homa psiko, tiam la superego estas la subtegmenta ejo. Populare oni povas diri, ke la subkonscio estas la




“animala” sektoro de la homa psiko, kaj la superego estas la “anĝela”.

Fakte en la originalaj germanlingvaj verkoj estas skribita ne *Unterbewusst* (subkonsci(aĵ)o), sed *Unbewusst* (nekonsci(aĵ)o). Tiu mistraduko kaŭzis gravajn miskomprenojn kaj misinterpretadojn. Tamen ankaŭ ni en jena teksto uzas la vorton subkonscio, konforme al la ĝenerala kutimo, kaj ne la vorton “senkonsciaĵo”, kiu tamen estus pli trafa.

El la karakter-tipologio de Jung iĝis famekonata la distingo, eĉ kontraŭstarigo de la *introversia* (internen turninta) kaj *ekstraversia* (eksteren turninta) tipoj.

Same grava estas la paro *dionisa* kaj *apolona* tipoj, t.e. la karaktero regata de emocioj kaj tiu regata de la intelekto.

Jung okupiĝis interalie ankaŭ pri interpretado de la alkemio, kaj pri la simbolaro de diversaj religioj, kaj okcidentaj (ekz. la protestantismo), kaj orientaj (budhismo ktp) sur la supre skizita bazo.

Li verkis nekredeble multe. Liaj verkoj ampleksas 18 dikajn volumojn. Selektitaj verkoj de C.G. Jung. (Surbaze de la 20-voluma eldono de liaj kolektitaj verkoj, germanlingve, fare de la eldonejo Patmos-Walter Verlag, urbo Düsseldorf, Germanio.)

- Pri la psikologio kaj patologio de la t.n. okultaj fenomenoj, 1902
- Pri la signifo de la subkonscio en psikopatologio, 1904
- Psikoanalizo kaj eksperimento pri asociado, 1906
- Pri la kritiko de la psikoanalizo, 1910
- Pri la nocio de libido, 1924
- Psikologiaj tipoj, 1928
- Spirito kaj vivo, 1931
- Tero kaj animo, 1931
- La arkaika homo, 1931
- Animo kaj morto, 1934
- Sigmund Freud kiel kulturhistoria fenomeno, 1934
- Picasso, 1934
- La rilatoj inter la Ego kaj la subkonscio, 1935
- Psikologio kaj religio, 1940
- Paracelso kiel kuracisto, 1942
- Paracelso kiel spirita fenomeno, 1942
- Psikologio kaj alkemio, 1943
- Pri renaskiĝo, 1950
- Pri la Mandalo-simbolaro, 1950
- Al la psikologio de la kristana-alkemia simbolaro, 1950
- La arĥetipoj de la kolektiva subkonscio, 1954
- Pri la evoluo de la personeco, 1972

# Patro Aleksandro Men

## Ĉu konata ĉe KELI-anoj?

Jacques TUINDER, NL

*Antaŭ dudek jaroj oni mortigis lin: tre populara pastro predikanta liberecon en lando, kie la kristana religio estis nedubebla tabuo. Absolute mi ne scias, ĉu li estas iom konata en KELI-rondo.*

Mi parolas pri Patro Aleksandro Men. Kiu li estis? Li naskiĝis en 1935 en Moskvo. Post sia militservo li studis biologion, sed ĉar li estis aktiva Rus-ortodoksa kredanto oni ne permesis al li ĝisfini sian universitatan studon. Tiam la akra kontraŭ-religia kampanjo sub Nikito Ĥruŝĉov atingis kulminan punkton. En 1958, kiam li havis 23 jarojn, li konsakriĝis diakono, post kiam li kompletigis siajn studojn en la Leningrada seminario kaj la teologia akademio en Moskvo. En 1960 sekvis lia pastriĝo. Aleksandro Men komencis animzorgi en pluraj vilaĝaj ekleziaj komunumoj de la provinco Moskvo; poste, en 1970, li fariĝis kunpastro en Novaja Derevnja. En 1988, kiam Ruslando celebris la jarmilan datrevenon de kristanismo, la politiko de la sovetaj superuloj rilate al religio radikale ŝanĝiĝis. Patro Aleksandro konsideris la novajn ŝancojn por predike kaĵ ateste disvastigi sian kredon elĉiela donaco. En tiu periodo pluraj alte edukitaj civitanoj klopodis fariĝi parlament-anoj, sed tion li ne ambiciis: *"Kiam ni povos liberigi tempon por okupiĝi pri tio? Nun ni havas la eblon prediki la Vorton de Dio."* Sian lastan prelegon pri la temo 'kristanismo' li faris tagon antaŭ sia morto...

Antaŭ iom pli ol dudek jaroj, en la frua mateno de la 9-a de septembro, la tiam 55-jara patro Aleksandro faris sian lastan promenadon en la direkto de la stacidomo. Nekonata persono survoje lin atakis, per hakilo mort-vundante lian kapon. Gute sangante li sukcesis ankoraŭ atingi la ĝardenan barilon de sia domo, kie li terenfalis por neniam plu releviĝi.

Lia morto kiel bombopluvo trafis tutan Sovet-Union. La lando ĵus estiĝis sub la sorĉinfluo de Mikaelo Gorba-ĉov, alportanta vere freŝan printempon, kiu ofertis bonajn ŝancojn al tiu kaj al ĉiuj pastroj. La lastajn jarojn de sia vivo li preskaŭ ĉiutage prelegis, predikis aŭ intervjuiĝis pri la kristana kredo en socio, kie religio dum sep-deko da jaroj estis severe malper-mesita. Li faris tion – parole kaj skribe – plen-energie, ĉarme, sprite kaj erudite.

*"Patro Aleksandro estis – samlinie kun Aleksandro Solĵenicin kaj Andreo Saĥarov – unu el la plej grandaj pensuloj kaj kontraŭ-totalitarismaj apostoloj de Rusio en la dudeka jarcento"*, diris pri li kolego-pastro. *"Li estis escepta disĉiplo de Dio , escepta pastro"*, opinias Jekaterina Genijeva , direktorino de la Biblioteko por Eksterlanda Literaturo, kiu konis lin jam kiam li estis kvarjaraĝa. *"Li estis homo alte disvolviĝinta, enkorpiganta la realan signifon de Dio, sed ne ĉiu tion bone komprenis. Li predikis la amon malfacile realigeblan, kaj li predikis liberecon. La homoj kiuj sekvas lin estas homoj flegantaj ĉi tiun senton de libereco kaj indeco."*

*"Li estis homo alte disvolviĝinta, enkorpiganta la realan signifon de Dio, sed ne ĉiu tion bone komprenis.*

La libereco, kiun patro Aleksandro disradiis, neniel estis en harmonio kun la totalitarisma medio, en kiu li ekkreskis. De liaj judaj gepatroj panjo konvertiĝis jam infanaĝe al la kristana kredo. En la tridekaj jaroj ŝi membris kun siaj infanoj en la subtera (katakomba) eklezio, kiu batalis por sia ekzistado sub peza kontraŭreligia premegado. En 1960 li kiel pastro kondutis tro neortodokse kaj netradicie en la okuloj de multaj kolegoj. Tre malkaŝe kaj klare li parolis pri – ankaŭ tabuaj – temoj kiel amo kaj amoro. Jam en tiu periodo li famiĝis kiel verkisto. Li artikolis en oficiala revuo de la Rus-ortodoksa eklezio, sed la pli granda parto de lia verkaro aperis anonime kaj publikiĝis neleĝe en eksterlando. Precipe de el Bruselo liaj verkoj sekrete disvastiĝis tra Sovet-Unio. Patro Men verkis i.a. sepvoluman historion pri la religio kaj komentarojn al la Malnova Testamento. Sed plej konata li fariĝis, kiam li aperigis legindan Kristo-biografion. *"Ĉio estas verkita en simplaj vortoj, kiuj enmergas la leganton en la vivon de tiuj kiuj postsekvis Jesuon Kriston en liaj tagoj, kaj ĉiam en maniero tre alirebla"*, atestas la franca profesoro pri slavistiko, Yves Hamant, aŭtoro de libro pri la vivo de la aminda pastro.

Hamant unuafoje renkontis patron Aleksandro antaŭ kvardek jaroj. "*La impreso kiun li faris al mi estis impreso de granda forto kaj serena ĝojo. Por povi renkonti lin necesis antaŭaranĝi multajn fortostreĉajn aferojn. Sed tuj kiam mi alvenis ĉe li, rapide forfalis ĉiu streĉo, ĉiu maltrankvilo. Oni sentis sin ĉe li tre sekura!*"

En tiu tempo li estis sub daŭra kontrolo de la Sekreta Servo KGB. Lia populareco kaj liaj kontaktoj kun sennombraj personoj, malamikaj al la komunisma reĝimo, faris lin ekstreme suspektinda. Li amikis i.a. kun Aleksandro Solĵenicin.

Ene de la Rus-ortodoksa eklezio Patro Men ne estas nekontestata teologo. Parto de la kredantoj, inkluzive

de pastroj, konsideras lin homo sekteca, kiu tro intime rilatas kun katolikoj kaj protestantoj. Kelkaj havas problemojn kun lia juda deveno. En la librobudoj ĉe preskaŭ ĉiuj preĝejoj oni ne povas aĉeti liajn verkojn, kvankam iom post iom la situacio pliboniĝas. La mesaĝo, kiun patriarko Kirill elparolis kaŭze de la dudeka datreveno de lia morto, estis grava en multaj oreloj kaj koroj. Li laŭdis la misian laboron de patro Aleksandro, per kiu 'multaj homoj ekhavis la kredon kaj fariĝis aktivaj membroj de la eklezio'.

La krime perforta morto de Patro Aleksandro ĝis nun estas mistero. Ĉu kulpas faŝistoj, ĉu la KGB, ĉu frenezulo? Neniam oni trovis pruvojn, kiuj gvidas al krimulo(j). En la loko, kie okazis antaŭ dudek jaroj la dramo, nun troviĝas simpla monumento florkovrita kiu rememorigas la murdon. Tuj apude staras kapelo kaj preĝejo de sankta Sergio Radoneĵ, kiu antaŭ sep jarcentoj vivis kaj laboris en tiu regiono.

*"Dum tiu periodo dudekjara eĉ ne unu momenton iu havis la senton ke li forestas. Male"*, diras Yves Hamant. ''Ĉiu sentas ke li ĉiam ĉeestas, kaj sendube tio estas unu el la kvalitoj de sanktuloj, ke ili restas aktivaj en la vivo kaj en ĉi tiu mondo, ankaŭ postmorte. Mi konsideras lin sanktulo. Ne estas tiom grave ĉu li jes aŭ ne estas kanone sanktproklamita. Li estas kredinda sanktulo pro la ekzempla vivo, kiun li vivis kaj pro sia eksterordinara verkaro spirituala, kies fruktojn ni povas pluki ĝis la hodiaŭa tago kaj por la venontaj jardekoj.

http://www.al-menn.ru/ind-eng.html



# mi memoras

Edinburgo 1977 estis mia unua kongreso kaj poste mi atendis 25 jarojn ĝis mi partoprenis denove KELI-kongreson en Berekfürdő 2002. Sur la foto vi, krom mi (plej maldekstre), ankaŭ trovas Philippe Cousson (iom kovrite), nian nunan prezidanton. Revojaĝante al Svedio mi tranoktis ĉe familio Tuinder en Nederlando.

*Bengt Olof Åradsson*

# Kongolando, la koro de Afriko

Jacques Tuinder, NL
Kun Alexandru Paŭl Calin, ĉefredaktoro de INIMA

Antaŭ nelonge mi legis elparolon de iu tiel nomata Afriko-specialisto. Li skribis: “*Se temas pri Afriko, ni ĉiam denove vidas mizeron, malsategon kaj internajn militojn. Sed tio ne estas la aŭtentika Afriko. En vero Afriko estas kontinento, kie ĉie videblas negocado, ekonomia kresko kaj multe da potenteco.*”

Nu, tion mi absolute ne spertis kiam mi en septembro pasinta dekdu tagojn misiis en Kongolando. Mi jes konstatis, ke la popolo havas fortan karakteron kaj la nepran volon vivi kaj supervivi. Ke Kongo estas belega lando, kiu serĉas propran vojon per sia brila lumo, sia ruĝa tero kaj siaj fortaj enloĝantoj.

Tre al mi plaĉas rakonto de Babah Tarawally, ĵurnalisto, rakontisto kaj verkisto de la libro La dio kun la bluaj okuloj*:*

“*Kial mi havas orelojn sur mia kapo?*”, mi kiel etulo demandis al mia saĝa avino. *“En via kapo sidejon havas skatolo plena de sekretoj, sentoj kaj deziroj, kiuj nur malfacile povas esprimi sin. Viaj oreloj ĉirkaŭvagadas sur la flankoj de via kapo por povi bone ekkapti la flustradon de via cerbo kaj la sentadon de via koro”*, ŝi respondis. *“Kaj kiun rolon ludas en tio mia koro, avino?”* Bonŝance mi havis paciencan avinon, kiu reagis al miaj demandoj ĉiam serioze. *“Ankaŭ la koro estas skatoleto, troviĝanta meze en via korpo, kiu konsekvence parolas la veron , sed kiun ne ĉiam aŭskultas viaj oreloj.”* Ŝi prenis mian manon kaj metis ĝin sur la maldekstran flankon de mia brusto. *“Mi aŭdas sonetojn kiel la tiktaktado de horloĝo. Tik. Tik. Tik. Ĝuste en la tago, kiam la koro finas sian regulan frapadon, ĝi fariĝas steleto!”*

Dume mia avino estas brilanta, radianta stelo sur la ĉielo, kaj mi fariĝis viro plenkreska. Nun mi scias, ke mia avino forgesis al mi rakonti ke mi mem devas plenigi la skatoleton antaŭ ol ĝi kapablas adekvate komunikiĝi kun miaj oreloj kaj teni



mian koron ekvilibra. La libro kiun David van Reybrouck verkis pri la historio de Kongo plene kaj laŭte paroligas la skatolon en mia kapo, batigas kun multe da bruo mian koron kaj zumigas miajn orelojn. Ĝi igas min pli riĉa, sed certe ankaŭ pli amariĝinta, ĉar ĝi donas al mi komprenon pri la malsanoj de Afriko. Kongolando estas la koro de Afriko. Ĝin ĉirkaŭas naŭ malvastaj vejnetoj, la lim-najbaraj landoj. La aŭtoro de la libro konsilas la leganton ne nur kulpigi la Okcidenton pri la kormalsano de Kongo, sed rigardi kritikeme ankaŭ la rolon de la naŭ mallarĝiĝintaj vejnetoj, kiuj bremsas la alfluon de oksigeno al la koreto, do al Kongo...

Tra la tuta, riĉa kaj sekve leginda libro teksiĝas, kiel ruĝa fadeno, formoj de psikoterapio. La aŭtoro parolas pri aferoj, kiujn ni, Afrikanoj, prefere ne ŝatas aŭdi, kaj samtempe li reguligas nian koron, per kio ni ekvilibriĝas kaj kapablas mastri nian koleron. Li alvokas nin al Afrika intergefratiĝo por celtrafe aliri al la malsanoj de Kongo. Ĉar kiam Kongo fariĝos steleto, mortos tuta Afriko!

La kunlaborantoj de Fondaĵo Evidente vidis kiel unu el la Kongolandaj malsanoj: ĉieajn okulproblemojn, preventeblajn kaj kuraceblajn. La fondaĵo preparas por 2011 novan mision al tiu lando kun granda kaj forta teamo, en kiu aktivos okulistoj, optikistoj, kaj specialistoj sur la kampo de tre malforta vidpovo! Volonte aŭdos servopretajn voĉojn kaj vidos helpantajn manojn el la vicoj de 'nia diligenta kolegaro'

Jacques Tuinder,
*prezidanto de Fondaĵo E-vid-e-nt-e*

# … homoj absolute ne 'duarangaj'

Ni donu apertan orelon kaj kompatan koron al homoj absolute ne 'duarangaj'!

Ĉiu kiu sekvas la agadon jam 44-jaran de Fondaĵo Evidente scias, ke ĝiaj okulspecialistoj ĉiam direktas sian atenton al la plejmalriĉuloj. Ofte dum siaj misioj ili okupiĝas pri okuloj de homoj en la urborandaj rubodeponejoj, kie ili klopodas helpi al vidhandikapitaj Rom-ciganoj.

Antaŭ nelonge Jacques Tuinder aĉetis la unuan numeron de trilingve redaktita stratĵurnalo de rumandevena nov-nederlandano, en kiu li trovis 'leteron al la legantaro', kiu pensigis lin kaj espereble pensigu ankaŭ aliajn. Jene ĝi tekstas:

Ni, homoj de la Rom-cigana popolo, vivas en tuta Eŭropo. Ni estas la deka plej granda minoritato en la Eŭropa Unio. La ĝeneral-sekretario de Amnestio Internacia en Aŭstrujo,

Heinz Patzelt, diras ke ni estas 'civitanoj duarangaj'. Nu, tio estas dirita iom eufemisme! La pasintan jaron en Milano policistoj radikale senhomigis kampadejon, ĉe kio 150 familioj perdis sian tegmenton. Nur kvar familioj ricevis novan loĝejon. En Ĉeĥio kaj Slovakio Rom-ciganaj infanoj aŭtomate estas sendataj al specialaj lernejoj sub la moto: ĉiuj Rom-ciganoj estas stultaj! En Ĉeĥio okazintus ankoraŭ eĉ en la jaro 2007 deviga steriligado de Rom-ciganaj virinoj. En Rumanio komplete forbruliĝis en 1991, sub komando de Deal, la pastro-urbestro de Bolintin, la domoj de 24 Rom-ciganoj. Poste ili devis sin kaŝi en la arbaro, ege timante atakojn. Tion kondamnis la Eŭropa Supera Tribunalo. En Hungario la situacio estas eĉ pli grava. La ekstrem-dekstra Jobbik-partio kaj ĝia duon-militista brako rekte ĉas-persekutas nin, Rom-ciganojn. Atakoj kaj eĉ murdoj estas ordinara afero ĉiutaga. En siaj SS-similaj uniformoj la Jobbik-faŝistoj sen ia ĝeno – provokante, detruante, homĉasante – marŝadas tra Rom-ciganaj kolonioj. La Germana Nobelpremiito por Literaturo, Günter Grass, jam ekde longa tempo postulas, ke Rom-ciganoj ekhavu sidejon kaj voĉon en la Eŭropa Parlamento. Tempo jam pli ol venis, ke tio finfine okazu!

Ĉi tiu ĵurnalo helpu defendi niajn interesojn por veki toleremon. Ĝi kreu la eblecon por niaj familioj perlabori iom da mono, por ke niaj infanoj ne malsatu kaj ni liveru valoran kontribuon al la socio-majoritato, en kiu ni vivas.

La titolo de nia ĵurnalo estas 'INIMA'. Ĝi estas vorto rumanlingva kaj signifas 'koro'. Ĉi-sence mi plej kore vin salutas,

Alexandru Paŭl Calin,
*ĉefredaktoro de INIMA*

# Tuja reago

Mi ne povas konsenti kun la supre menciita aserto, ke en Ĉeĥio ĉiuj romaj infanoj devas vizitadi specialan lernejon. Tio okazas nur, se la infano ne scias ĉeĥan lingvon. Ekzistas Romoj, kiuj absolvis universitaton, do ili devis viziti normalan bazan kaj mezan lernejojn….

Same ne estas vero, ke estis romaj virinoj sterilizitaj. Tio okazis nur escepte kaj el medicinaj motivoj...

Pavel Polnický

# Kelkaj ideoj de Søren Kierkegaard

## 2:a parto de prelego dum la KELI-kongreso 2010
(bazita sur la sveda ”popularigita” libro pri Sören Kierkegaard)

Bengt Olof ÅRADSSON, SE

La 1:a parto troviĝas en Dia Regno 1/2011

**al la sekvonta paŝo – voĉo vokas**
Ĉio estas enuiga, libroj, homoj, prelegoj, vetero kaj eĉ mi mem estas enuiga. Mi emas nenion. La solvo, kiun oni scias estas pli de io, pli da laboro, pli da mono, pli da vojaĝoj, nova partnero, nova domo – sed nenio helpas.

Laŭ Sören via interna spirito vokas vin. Estas signo de saneco. Vi ekkomprenas vian eternan valoron. Ni estas laŭ Kierkegaard unueco de spirito kaj materio, de eterno kaj tempeco. Ĝis nun la ekstera, fizika mondo ricevis la atenton sed la interna spirito estis forgesata. La korpo estas sata sed la spirito malsategas. Kaj la tuta unueco estas en malharmonio. Tiun voĉon, kiu atentigas vin pri via situacio, vi esperable aŭdas.

2. Rilato al si mem
2.1. – ĉeesti en si mem
Kiu enuas en si mem, tiu havas malbonan tempon. Oni komprenas ke oni devas ion fari, sed tamen daŭrigas la saman vojon kiel antaŭe, ĉar neniun alian konas. Laŭ Kierkegaard oni devas serĉi sian propran veron. Tio kio estas vera por mi. Ekzistas multaj veroj. La sciencistoj scias multajn faktojn kaj verojn, sed pri multaj aĵoj ili nenion povas pruvi. Ili ne havas veron pri etiko, gusto, valorjuĝoj, vivsinteno, religio ktp. Pri tiuj aĵoj ni povas havi nur niajn proprajn opiniojn. Ekzemple: ĉu la koloro ruĝa estas bela aŭ malbela? Ĉu estas pli bone esti vegetarano ol viandmanĝanto? Aŭ iom pli malfacile: vi scias vi havas konsciecon – sed kio estas, kion ĝi signifas. Kaj ŝajne ankaŭ scienculoj ne scias la respondon. Kaj pri la eternaj demandoj – ĉu la vivo havas iun intencon, iun celon, iun signifon? Ĉu ekzistas Dio aŭ ne, ĉu estas vivo post la morto?


Karikaturo montrante Kierkegaard

Ies respondo estas same bona kiel tiu de iu alia. Kaj tio estas via subjektiva vero. Dum siaj lastaj jaroj Sören multe protestis kontraŭ tiuj kiuj en sia profesio aŭ posteno opiniis ke ili havas pli bonan veron ol aliaj. Pripensu kiom vi fakte scias. Plejmulte

de nia kono estas la vero en 2a, 3a aŭ eble eĉ 4a vico. Scioj kaj opinioj kiuj jam pasis de unu al alia. Multaj el tiuj veroj estas kunaj en apartaj grupoj kaj societoj. Ofte ili ne donas problemon sed kelkfoje okazas ke tiuj 'veroj' vere ne estas veroj sed falsaj eldiroj kiuj ofte ripetiĝas kaj iĝas 'preskaŭ veroj' en la komuna pensmaniero. Per tiuj komunaj veroj ni faras barilojn kiuj helpas protekti nian grupon kaj niajn normojn sed ankaŭ malproksimigas nin de aliaj grupoj kiuj ne havas la samajn 'verojn'.

Laŭ Sören, la plej danĝera situacio okazas kiam tiuj veroj malhelpas nin vidi nin mem, renkonti nian internan spiriton. Ni faras barilon ĉirkaŭ nia interna egoo.

> Per tiuj komunaj veroj ni faras barilojn kiuj helpas protekti nian grupon kaj niajn normojn sed ankaŭ malproksimigas nin de aliaj grupoj kiuj ne havas la samajn 'verojn'

Renkonti sin mem, trovi sian propran veron estas la plej grava tasko en tiu ĉi stadio laŭ Kierkegaard. Ĝis nun mi vivis laŭ-ekstere, kun intensa dialogo kun la ekstera mondo. Nun la interna spirito volas ŝanĝi starpunkton kaj permesi al la interno gvidi vin. Sed tio ankaŭ postulas ke vi akceptu vin mem – vin mem kiel vero, viajn sentojn, viajn opiniojn. Ekkonu vin mem diris Sokrates. Sören nomas tiun procezon – aŭtentiĝo. Trovi sin mem kie oni estas kaj tie komenci. Laŭ Sören, plej grave ne estas edukado, labora posteno, familio, infanoj aŭ simile. Plej grave estas trovi sin kaj esti si mem. Kaj tio postulas tempon, kuraĝon kaj honestecon. Por kelkaj pli malfacile ol por aliaj, ĉar ni volas ofte plaĉi al aliaj, aparteni al iu grupo, esti iu alia. Ne la cirkonstancoj malhelpas min esti aŭtenta, sed mi mem. Mi simple ne volas. Kelkfoje kostas iom sekvi la internan spiriton. Ni timas kritikon, ni timas solecon, ni timas perdi la kunecon de la grupo.

Ĉu ni kuraĝas eldiri niajn opiniojn kiam invititaj al tagmanĝo kaj mi ne samopinias kun la opinioj de la aliaj – se ekzemple temas pri enmigrantoj, aŭ pri samseksaj geedziĝoj.

Samtempe estas facile esti aŭtenta laŭ Sören. Ni ne bezonas kursojn aŭ terapion aŭ membrecon en iu grupo. Nur postulas ke mi trovu la profundan rilaton kun mia interno. Tio ankaŭ tion signifas ke mi provu rigardi mian ĉirkaŭan mondon kiel eble plej objektive – kia ĝi vere estas. Per malferma scivolemo rigardi ĝin kaj min mem sen iu juĝo. Sen interpreto, sen distordo, sen maltrankviliĝo, nur atente observi kio okazas, kaj interne kaj ekstere. Tiu kiu vivas en rilato kun sia interna spirito ofte surpriziĝas pri si mem kaj trovas novajn flankojn – kaj bonajn kaj ne same agrablajn.

### 2.2. La volo elekti

*"La elekto estas decidiga por la enhavo de la personeco – per la elekto ŝi [la*

*personeco] profundiĝas, kaj kiam ne elektas, ŝi forvelkas"*

Nia vivo estas plena de decidoj. Depost ni vekiĝas matene ĝis ni enlitiĝas vespere. Ĉiu decido, laŭ Kierkegaard, malkovras kiu vi estas. Ĉu viaj bazaj konceptoj kaj valorjuĝoj estas viaj propraj aŭ hereditaj aŭ eksteraj? Ankaŭ la minusklaj decidoj montras ion pri mi. Ekzemple ĉu mi subtenas la agadon por protekti la naturon kaj agas laŭcele aŭ por komforto iom kontraŭcele – veturas per aŭto kiam eblas per publikaj veturiloj, aŭ aĉetas plastajn sakojn en la vendejo. Do kiel profunde mi rilatas kun mia interno, miaj emocioj, miaj valorjuĝoj, mia spirito – kun mi mem?

Kiam ni troviĝas en la unua stadio – la fizika mondo – niaj decidoj estas nekonsciaj ne pripensitaj, ili respegulas nur la tempon, la modon, nian originon. Sed nun en la dua stadio – niaj decidoj komencas malkovri nian internon, niajn emociojn, nian profundecon.

Niaj decidoj ne donas garantiojn. Ni vivas konsciaj ke ni nenion scias pri la morgaŭo kaj kiamaniere niaj decidoj kunagas kun la konstanta fluo de la mondo kaj aliaj homoj. Tio povas doni al ni angoron. Kaj interne en ni batalas du fortoj – unu forto kiu kuraĝe volas antaŭen kaj alia kiu timeme volas resti. Do ni ĉiutage havas tiun internan maltrankvilon aŭ tension. Tute natura ĉiama tensio al kiu ni devas alkutimiĝi kaj ne foreskapi.

Laŭ Sören ni nur povas elekti laŭ niaj internaj emocioj, nia profunda konvinko kaj nia interna spirito. Ni ne scias en la decida momento ĉu ni elektas ĝuste aŭ erare. Ni ne vidas la konsekvencojn. La tuta mondo konstante ŝanĝiĝas, kaj per tiu ĉi maniero ni partoprenas kiel eble plej forte. Niaj decidoj estas propraj kaj solaj kaj temas pri la estonteco. La konsiloj de aliaj estas ĝeneralaj kaj malnovaj. Laŭ la vortoj de Sören *"La vivon eblas kompreni nur malantaŭen sed ni devas vivi antaŭen"*.

2.3. La kuraĝo agi

*"La grandeco ne troviĝas estante tiu aŭ tiu sed esti si mem, kaj ĉiu kiu tion deziras, kapablas."*

Mi supozas ke ĉiu iam sentis la angoron antaŭ iu preciza decido kaj post la decido la grandan malŝarĝiĝon. Kierkegaard nomas tion la Granda Salto. En tiu momento kiam la decido iĝas ago ni sentas la efikon de nia libereco, kiu laŭ Kierkegaard estas ni homa rajto. Ne nur la rajton pripensi sed ankaŭ sekvi nian internan voĉon, sen limoj, sen postuloj, sen iu falsa memprezentado. Tio kion vi faras formas vin.

Sed se mia ago vundas iun alian homon? Laŭ Kierkegaard ekzistas du manieroj kompreni nian volon – aŭ kontraŭpolusa – niaj agoj estas aŭ bonaj aŭ malbonaj – aŭ niaj agoj estas tute neŭtralaj. Laŭ li niaj agoj el nia plej profunda sento estas nek bonaj nek malbonaj – ili estas ĝustaj. La koncepto pri bona kaj malbona ŝanĝiĝas de tempo al tempo kaj de kulturo al kulturo. Antaŭ kelkaj jardekoj, ekzemple, oni devis honti pri ekstergeedziĝaj infanoj kaj simile

samseksulaj geedziĝoj estis neimageblaj. En iu preciza situacio mi devas decidi kaj elekti mian agon.

La agoj de unu homo kontrastas kun tiuj de aliaj homoj kaj el tiu renkontiĝo elformiĝas la homa kulturo. Ni agas kaj reagas jam dum jarmiloj kaj tiel daŭrigos. Nia socio estas eterna evoluo. Kio estas bona normo hodiaŭ verŝajne ne restas same morgaŭ.

Kiam miaj agoj estas en harmonio kun mi mem senkonsidere la sekvojn mi estas aŭtenta homo laŭ la ideo de Kierkegaard. Mi ne estas pli feliĉa, sed mi estas pli klara kaj komprenebla.

Kontraste kun multaj el la sekvaj ekzistadismaj filozofoj, Kierkegaard opiniis ke ekzistas ankoraŭ unu stadio. Je la fino de la sesa paŝo la interna voĉo denove vokas min ke mi daŭrigu mian serĉadon.

Ĉu io ekzistas kio estas pli granda ol mi? Imagu se la respondo estas ne? nenio ekzistas kio estas pli granda ol vi! Ĉu ne timiga penso?

La nuna paŝo estas pli granda ol tiu inter la unua kaj la dua stadio – inter la rilato kun la fizika mondo kaj la rilato kun mia interno. Nun kiam mi serĉas la spiritan stadion multaj prijuĝoj aperas. Ĉu mi mense malsaniĝas? Ĉu mi komencas esti religia homo? Kaj se vere ekzistas iu spirita mondo – kion tio signifas por mi? Ĉu mi vere volas scii? Mi dum longa tempo batalis por esti aŭtenta homo kaj nun mi devas denove ĵeti min en nesekura serĉado. Al spirita sperto mi ne povas esplori fizikan mondon, mi ne povas per introspekto esplori min mem. Al spirita sperto mi simple devas transdoni min mem, kaj malfermi min por la nekonata.

Kierkegaard opiniis ke ekzistas spirita dimensio. Li uzas multajn nomojn por ĝi: eterno, infiniteco aŭ simple Unu aŭ Ĉio. Li ne volas uzi la nomon Dio ĉar, laŭ li, tiu nomo portas multe da kromŝarĝo aŭ balasto.

Kompreneble li ne povas iel pruvi la ekzistadon de iu spirita dimensio. Laŭ Kierkegaard tiu demando estas neniu-demando. Ni, kiuj estas limigitaj de tempo kaj spaco ne povas kompreni tiun dimension. Mi devas daŭrigi mian serĉadon alimaniere kaj ne science. Mi same multe scias pri ĝi kiel iu alia. La eldiro de iu alia estas provizora – ni ĉiuj estas serĉantoj. Serĉu pli malproksime, for de via aŭtenta egoo. Se ni *ne* daŭrigas nian serĉadon, ni perdiĝas en la 'granda malespero'.

Sed ni ne intermiksu nian individuan opiniion pri ebla vera spirita realeco. Se ni ion spertas aŭ havas manifestiĝon de tiu dimensio, ni ne povas pruvi ĝin. Ni neniel scias ĉu estas la tuta vero aŭ nur malgranda ero de ĝi aŭ nur cerba ludo. Tiu sperto estas vere individua kaj subjektiva sperto. Tiu kiu spertis ion gravan, volas tion rakonti al aliaj, sed por tio mankas vortoj.

Se via interna voĉo vokas vin kaj devigas vin serĉi pluen, tiam vi devas respondi. Tiel kredis Kierkegaard. Vi devas akcepti vian internan sopiron, kaj profunde serĉi for de vi, for de via individueco kaj eĉ pli fore.

daŭrigota

# "… tie estos ankaŭ via koro"

## la 33a Germana Evangelia Foiro

Hedwig FISCHER, DE




Jen la moto de la 33a Germana Evangelia Foiro, kiu okazos de la 1a ĝis la 5a de junio en Dresdeno. Pli ol 100.000 partoprenontojn oni atendas ĉijare.

La nomo *"Germana Evangelia Foiro"* (Deutscher Evangelischer Kirchentag) ne nur rilatas al la grandega plurtaga evento, kiu ĉiun duan jaron okazas ie en Germanujo, sed ankaŭ al movado de evangeliaj laikoj malantaŭ ĝi. Laŭ sia memkompreno la Germana Evangelia Foiro estas libera unuiĝo de homoj, kiujn interligas la kristana kredo same kiel la engaĝiĝo por la estonteco de kredo kaj mondo. Tamen la movado sentas sin institucie sendependa de la evangeliaj eklezioj.

Laŭ la tradicio la ĉefaj temaroj bazas sur la moto *"… tie ankaŭ estos via koro"* el la evangelio de Mateo. Temas pri la tri kampoj: la spirituala, la socia kaj internacia kampo.

La titolo de la ĉefa podio en la unua kampo estas *"Dio, Feliĉo, Mono"* . Tie oni pridemandas la kolektadon de trezoroj en la ĉielo kaj sur la tero. Regiona projekto en tiu kampo pridiskutas kredokomunikadon en sekulara medio. Grava celo ankaŭ estas la ellaboro de novaj adekvataj spiritualaj lingvo- kaj esprimoformoj. La organizantoj promesas, ke la 33a Germana Evangelia Foiro estos la plej ekumena de ĉiuj ĝisnunaj.

En la dua kampo la ĉefa podio nomiĝas "*Germanujo en fundamenta ŝanĝo"*. Gravas tiurilate demandoj pri la ĝisnuna koncepto de konstanta ekonomia kreskado same kiel la demandoj pri la respondeco de kristanoj por justeco kaj la kreado de pli bona mondo. Kiugrade eklezio kapablas esti fundamente ŝanĝiga forto, oni ekzemple demandas.


Dresdeno

La tria kampo enplektas la tutan mondon, tion montras ankaŭ la temo de la ĉefpodio *"Tutmonda mastrumado"*. Gravas en tiu kadro paciĝo, kaj regiona (Eŭropo) kaj tutmonda, sume temas pri cerbumado por morgaŭ.

La programo de la Germana Evangelia Foiro obeas certan tradician kadron. Ankaŭ en Dresdeno ĝi komenciĝos per kelkaj malfermigaj diservoj en centraj placoj de la urbo merkrede vespere. Sekvos la *"Vespero de la renkontiĝoj"* en la urbocentro. Tie prezentos sin diversaj aktoraj kaj muzikgrupoj, oni ofertos regionajn manĝaĵojn kaj senalkoholajn trinkaĵojn ktp. Tiu vespero de la renkontiĝoj allogis dum la lastaj jaroj pli ol 400.000 gastojn kaj iĝis la plej granda stratfesto en Germanujo.

Ĉiu tago de la foiro komenciĝos per bibliaj rondoj, kiuj okazos en tute diversaj kadroj, inter granda foira halo kun ĝis mil aŭskultantoj kaj malgrandaj grupoj kun dek personoj. Laikoj, kiel artistoj aŭ politikistoj, aŭ teologoj gvidos la bibliajn rondojn.




Grava parto de la evento estas la *"Foiro de la Eblecoj"*, kie prezentiĝas ege diversaj grupoj, ankaŭ neekleziaj. La standoj sekvas certan laŭteman ordigosistemon. La Germana sekcio de KELI komprenebie ankaŭ prezentas sin tie. La stando apartenas al la bloko "*Interreligia kaj Interkultura Komunikado".* Ni esperas, ke ne nur Esperantistoj malkovros la standon, sed ke multaj de la aliaj vizitantoj gajnos bonan impreson pri Esperanto.

Por multaj partoprenantoj la kultura programo de la Germana Evangelia Foiro plej gravas, la koncertoj, muzikprezentadoj, kabaredoj, teatraĵoj ktp. por aliaj plej gravas la spiritualaj ofertoj. Ĉiu certe trovos *"sian trezoron, kie estos la koro"*.

Venu al Dresdeno!

# 61-a KELI kongreso – 3:a listo de aliĝintoj

**2.– 9. 8. 2011, PODĚBRADY, Ĉeĥio**

44. Gromov Viktor, RU
45. Hodusova Mila, RU
46. Hofmann Gerhard, DE

Pli da informo pri la kongreso kaj aliĝilon vi trovas en numero 5/2010 aŭ kontaktu la sekretarion:

Pavel POLNICKÝ, Na Vinici 110/10, CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
Tel: 420 325 615 651; E-mail: cea.polnicky@quick.cz

# WERL: Bibliaj tagoj de la 2a – 6a de marto 2011

Raportas Gerda DERCKS, NL
kaj Karl Heinz SCHAEFFER, DE

En Germanio okazis inter la dua kaj la sesa de marto kristana renkontiĝo en la urbo Werl. Titolo de tiu kunveno estis *"Bibliaj Tagoj 2011"* .

Krom germanaj kristanaj esperantistoj ĉeestis ankaŭ alilandanoj (el Italio, Francio, Nederlando, Ĉeĥio kaj Slovakio). Ni travivis multajn preĝajn kaj kantajn horojn. La respondeculo de la tagoj estis la juna katolika kantoro Stefan Lepping. Li orgenludis kaj gitarludis kaj nin bone gvidis per la helpo de la Biblio kaj per nia ekumena Diserva libro "ADORU" .

Ni povis preĝi ĉiutage la rozarion, okazis ĉiutage Sankta Meso, matena, tagmeza kaj vespera preĝoj. Por ni, ĉio estis nekutima sperto kiam Stefan Lepping celebris preĝan kunvenon laŭ ortodoksa rito de Sankta Krizostomo. Ĉiumatene je la 10a horo prelegis por ni Frato P. Willibald el Klostro de Nütschau. Dum niaj tagoj en Werl ni ankaŭ vizitis plurajn muzeojn kaj preĝejojn en Werl kaj en



Placo kaj Wallfahrts-preĝejo

la urbo Soest. Ni vidis filmon pri la jubilea kongreso de IKUE en Parizo, gvidis kaj montris al ni la prezidanto de IKUE Miloslav Ŝvaĉek.

Albrecht Kronenberger kaj Bernhard Eichkorn, kiuj estas kuneldonistoj de la libro "ADORU" ankaŭ ĉeestis. Albrecht Kronenberger faris prelegon pri la nova interreta portalo "Kristanaj fontoj". Li nin informis:

"La nova interreta portalo de Bernhard Eichkorn kaj mi, prizorgata de Albert Josef Urban, estas oficiale malferma ekde la unua dimanĉo de Advento. La retejo enhavas inter alie la Biblion, la tutan tekston de ADORU en formo de elŝutebla pdf-dosiero, multe da aktualigita materialo pri ADORU, kaj ĉefe - rigardu, aŭskultu kaj eble ludu mem! – multajn pianoaranĝojn de Ernst Leuze. Ĝi servas ankaŭ kiel arkivo de DIA REGNO, kaj donas spacon por viaj propraj manuskriptoj. Je ĉiu tago vi trovas spiritajn impulsojn, inter alie la ĉitagan vorton laŭ la frataro de Herrnhut. Ligiloj gvidas ekzemple al la tuta teksto de la Meslibro kun Legaĵaro kaj al la arkivo de DIO BENU." http://www.ikue.org/adoru/adoru.htm.

Estis tre agrabla aranĝo – ni ĝuis la programon, ludadon, babiladon kaj la kantadon.

# Mi komencis lerni ...

Astrid Hanke, DE

Esperanton fine de 1973, kiam pastoro Gerd Brinkmann venis al Westerland. Post duona jaro de lernado mi partoprenis en la UK 1974 en Hamburgo. Tie mi aliĝis ankaŭ al KELI, kiam Tini Putto estis sekretariino de KELI.

1976 mi partoprenis en la KELI-kongreso en Montpellier. En la sama jaro mi transprenis la kason de la germana sekcio de KELI, la ekumena ligo dum regiona nordgermana renkontiĝo en Westerland. Mia unua tasko estis, formi el kaosa "kaso" ordigitan librotenadon.

Poste dum kelkaj jaroj mi ne restis nur ĉe la administrado de la kaso, sed mi ankaŭ transprenis ekde 1995 la respondecon pri realigi informstandon pri Esperanto dum la evangeliaj ekleziaj tagoj en la tielnomata foiro de la ebleco. Ĉi tiuj evangeliaj ekleziaj tagoj okazas ĉiun duan jaron en diversaj germanaj urboj. Mi organizis la preparon, tiamaniere, ke mi serĉis kaj petis Esperanto-amikojn el la koncernaj urboj, por ke ili helpu min, anstataŭi min dum la preparkunvenoj en la koncernaj urboj.

Mia tia koncepto bone funkciis en Stuttgart, Frankfurt/Main kaj Berlin (dum la ekumenaj ekleziaj tagoj). Bedaŭrinde 2005 en Hannover mi ne trovis anstataŭanton por la preparkunveno. Ankaŭ la kunlaborantoj ne plu estis tiom abundaj. Pro tio mi petis dum la jarkunveno de la Ekumena Ligo en Braunschweig pentekosto 2006, ke iu alia transprenu la respondecon kontraŭ la Kirchentag. Feliĉe, Reinhard Pflüger estis preta, transpreni la respondecon, organizi la informstandon pri Esperanto dum la Ekleziaj tagoj.

Nur tri tagojn post mia reveno el Braunschweig mi suferis en Westerland je apopleksio, kaj ĉi tiu malsano plifortigis mian revon, transdoni la respondecon pri la kaso de la Ekumena Ligo al iu alia.

Feliĉe fine de la jaro 2010 deklaris Hedwig Fischer sin preta, transpreni ĉi tiun taskon, kaj mi estas tre danka al Hedwig pro tio. Mi deziras al ŝi multan kuraĝon, ĝojon kaj bonan sukceson. Mi tre dankas ankaŭ al Werner Pfennig, ke li estas preta, daŭrigi la taskon de la kaskontrolo.



Raymonde Coquisart (maldekstre) kaj Astrid Hanke (dekstre)

# Psalmo 138

## Mi Gloras Vin El Tuta Kor'




2. Vi alte tronas en ĉiel',
min en malhel' Vi tamen vidas.
Mi iras meze en sufer',
sed el mizer' al Vi mi fidas.
Di', kontraŭ malamik-atak'
per forta brak' Vi min kirasu.
Kaj kion kreis Via man'
laŭ bona plan', Vi ne forlasu.

Psa 138
Mi Gloras Vin El Tuta Kor' • germane (Mein ganzes Herz erhebet dich) en: GL 264, EG (Pfalz) 620, KG 531, RG 92, EM 9 • M (Psalmo 138): Lyon 1543, Loys Bourgeois 1547/1551, LvK p. 235 • E (originale verkita): Albrecht Kronenberger 2011-02-11, laŭ instigo de Franz Georg Rössler

trovebla en KRISTANAJ FONTOJ
http://fontoj.net/ > Trezorejo (aŭ: > kanti) > KRISTANAJ KANTOJ